

La Urso, la Lupo kaj la azia Krabro

Ĉu la Homo devu modifi la evoluon de la Naturo fronte al malaperemaj aŭ invademaj specioj, aŭ laŭ sia nura intereso, enklasigante speciojn kiel *Utilaj* aŭ *Nocaj*, aŭ laŭ transcenda ideo de *Bono* aŭ *Malbono*

Ekologistoj nature pensas ke la Homo devas protekti la Naturon : "*Ni savu endanĝerigitajn speciojn*".

Tamen la Naturo fajfas pri malapero de specioj. Sencese tiuj, kiuj ne adaptiĝas al ŝanĝoj de sia medio, rapide malaperas profite al novaj, kiuj tie trovas ekologian neston. Tio eĉ estas la ŝlosilo de la darvina evoluo. Nur kokinoj kaj lacertoj memorigas dinosaŭrojn.

La Naturo eĉ ne zorgas ke la Tero iam estiĝos dezerto kiel Marso. Ĝi agadas laŭ siaj fizikaj striktaj leĝoj. Ĝi estas memreguligata aro ĉiam movanta. Diversaj kaj pluregaj fortoj interalfontiĝas en ĝi, en sencesa generala interagado. Ĉiu rezultanta ago, eĉ tre malgranda, havas multegon da kialoj. "*La papilia efiko*", elvokita de meteorologisto, bone ilustras samtempe la determinismon de agoj kaj la fakte neantaŭvidecon de konsekvencoj¹.

"*Helpi la Naturon*"

Helpi la Naturon estas do sensensaĵo, ĝi tute ne tion bezonas. Laŭ Spinozo, interna potenco (*konatus*) instigas ĉiun estaĵon "*persisti en sia estado*"², t.e .disvolviĝi laŭ sia inteligenteco, sia kompreno de sia medio Ĉiu specio agas nur por sia propra intereso, laŭ lokalaj eblecoj kaj prapatraj spertoj, kiuj instigas sciuron fari por si kaŝitajn provizaĵojn da aveloj.

De nun, dank'al sia inteligenteco kaj sia teknika potenco, la Homo kapablas agi sur la tuta planedo, kun grandega efikeco. Tamen deziro de rapida profito malhelpas lin bone taksi ĉiujn lontanajn konsekvencojn de siajn agadojn. Tiel ke li jam kapablas detrui sian propran ekologian neston.

Koncerne specioj, li enigis kuniklojn en Aŭstralion, kiuj multiĝas pro manko de naturaj predantoj, kaj detruadas ĉiun vegetaĵon, dum en Francujo li dissemas miksomatozon, kiu malplenigas kuniklejojn kaj senesperigas ĉasistojn. Nepras elakvigi el Mediteraneo la enmergitajn malnovajn poluantaajn pneŭojn, kiujn oni esperis estiĝi kovejo de fiŝoj. Se pluas deziro gardi speciojn, kial freneza scienculo ne sukcesos iam vekti la DNA-n de iu terura prahistoria monstro, kiel imagis Bulgakof³.

"*Protekti la Naturon*"

Generale protekti la Naturon ? Tio estas ankaŭ sensensaĵo, ĉar ĝi mem nenion protektas. Ĉio, kion ĝi produktas, estas pereonta, detruigita. Nenio ŝajnas al ĝi indi protekton. Ĝi recikligas. El malnovaĵoj ĝi faras novaĵojn kaj novigas. Protekti ĝin, kiu estas nura movo, estus deziri ĝin neŝanĝeblan, fari el ĝi muzeon. Nur la Racio de la Homo povas konsili lin provi fleksi la

¹ Edward N. Lorenz, « Ĉu flugilbato de papilio en Brazilo kapablas elkliki tornadon en Teksaso ? » Prelego 1972, publikitan angle en : *The essence of chaos*. The Jessie and John Danz Lecture Series, University of Washington Press (1993).

² Spinozo Etiko

^{3 3} Boulgakof N. Les œufs fatidiques (Fatalrivelaj ovoĵoj)

dinamikon de la Naturo por havigi rezultatojn, kiuj finfine profitigos NUR AL LI, sen katastrofoj kiuj endangerus lin.

La Homo taksas kruelan la Naturon. Tamen, tra li kaj eble kelkaj konsciaj specioj, ĝi sen ekstera helpo disvolvigis en si sentimentojn, kompaton, nostalgion, belecon, poezion, muzikon, finfine kulturon. La ideo protekti estas homa, korinklina identifiĝo kun kion oni deziras protekti.

Ve, Pasioj estas pli ofte ol la Racio ĉefa movilo de niaj agoj. Spinozo sugestas liberiĝi el maniĥeismaj transcendaĵoj de "Bono" kaj "Malbono", por taksu dank'al la Racio kion objektive estas "Utila" aŭ "Noca" por la intereso de la Homo en lia medio, kun ĉiuj la gradoj inter tiuj ekstremoj, inkluzive kio ŝajnas simple vanta. Kiam "ekologia" ago estas gvidita de pasio, despli se oni esperas iun ajn profiton el ĝi, "racia" decido povas esti tre devojgita.

"Protekti la Urson"?

Enmeti en Pireneon, helikoptere dankon (!), du gravedajn ursinojn, kiam tia medio klare ne plu estas tre bona por ili, ŝajnas al mi la plejsupro de neracia frenezo.

Kian Utilecon havas tia re-enkonduko por la Homo ? Oni malfacile trovas ĝin en la dokumentoj skribitaj de ĝiaj aprobantoj⁴ La Urso estas diversovora, ĉefe vegetara. Ĝi ne estas bona helpanto por malrapidi la cervan multiĝadon. La vulpo efike zorgas pri tiu de ronĝuloj kaj aliaj etaj mambestoj. Certe protektado de ŝafaroj havigos laboron al ŝafistoj de tiu montaro. Mi pensas ke ĝi, certe tre respektinde, utilos ĉefe al la nostalgia pasio pri la urseto de infanaĝo, al la figuro de ideala Pireneo, al "kultura pirenea identeco", respektinda ĝis kiam ĝi estas poluata de esperotaj turismaj profitoj. Ĉu turistoj vere alvenus ĉefe pro la Urso ? Mi imagas ke ili ne vidos ĝin proksime, kio feliĉe estus bona ŝanco por ili. Ĉu ilia amasalveno estus ĉiam bona kaj bonvena ? Malgraŭ ĝia sentimenta valoro, mi klasifikus tian pasion plivole kiel "vantan", ĉar la profito por la homaro ŝajnas al mi tre akcesora.

Noca aspekto de la Urso estas ke li tre gustas ŝafinojn, kaj akcesore mielon. Bredistoj estas kompensita pri siaj perdoj, sed kio pri sia maltrankviligo, angoreto, timo. La Urso tute malordigas la montaran vivon. La loka medio ne ŝajnas al mi pli favora al ĝi ol antaŭ jarcento. Strebo por ĝia re-enkonduko tre varŝajne estos finfine vana. Se mi devu partianiĝi, eble mi diru ke ŝafinoj venkos.

"Protekti la Lupon"

La problemoj pri la Lupo ŝajnas malpli simpla. Ekde la Ruĝkufulineto, malgraŭ la Roma Lupino, la figuro de la Lupo ne estigas la simpatian, kies profitas la Urso, Ne ekzistas oficialaj provoj de re-enkonduko, ĝia reveno ŝajnas okuri tute nature. Ĝin favoras senpopoligado de kamparo kaj pligrandiĝo de arbaro, kie multiĝadas sovaĝa faŭno, cervoj, aproj, kiuj havigas al ĝi abundan nutraĵon. Genetika analizo pruvas ke la Lupo, kiu revenis francujon, devenas de Italio. Ĝi helpas arbaristojn por batali kontraŭ kapreoloj, kiuj detruas arbojn en plantejojn. Ili ŝatas ĝin, sed ĝi nature kolerigas bredistojn⁵. Ĉiookaze, la medio denove favoras ĝin. Onidire la Lupo ne atakas la Homon, tamen historistoj kontraŭas tiun opinion⁶. Mi provas kutimiĝi kun ĝia *neresistebla supreniro*, timanta tamen renkonti ĝin en aŭvernja arbaro, dum mi antaŭe vivis

⁴ Franclingve <http://www.paysdelours.com/fr/ours/>

⁵ <https://www.geo.fr/histoire/la-france-en-pleine-guerre-du-loup-1824>. (Historio: Francio tute en lupbatalado)

⁶ https://www.sciencesetavenir.fr/nature-environnement/l-homme-et-le-loup-une-longue-histoire-de-passion-et-de-peur_121423. Franclingve (La Homo kaj la Lupo, longa historio de pasio kaj de timo)

trankvile serĉante fungojn, pensante ke ĝi malaperis. Mi nur memoras familian historion, pri praavo, kiu alfrontis lupon en sia vinberejo kaj buĉis ĝin per serpa frapo. Tiel longe ke nokte ni ne devu barakti revolvere kontraŭ luparo, kiel rakontas Bulgakovo⁷, ni devu toleri ĝin. Tamen, lupoponantoj diras alian historion. Novaj genetikaj analizoj elmontras ke ekzistas almenaŭ kvinj specioj de lupoj, kiuj alvenas en Francion, kun granda parto de hibridoj inter hundoj kaj lupoj⁸. Tiuj hibridoj ne estas protektitaj de la Berna Konveno, sed kaŭzas multajn damaĝojn en ŝafaroj⁹. En malfermitaj spacoj kie feliĉaj ŝafinoj libere paŝtiĝadas, ili senveprigadas arbarojn kaj makisojn. Tiel antaŭmalhelpas arbarbrulegojn. Enfermi ilin en ĉirkaŭbareĵojn kaj ŝafeĵojn, sub gardado de hundegoj, ne favoras animalan bonstaton. Ĉasistoj estas iliaj amikaj apogantoj, kaj kiu ne ŝatus bonan femuraĵon de kapreolo...klare, ne mi.

La diskuto do ne estas estingita.

Kaj la aliaj ?...

Post kiam oni klarifikis animalon inter *bonan* aŭ *malbonan*, *divan* aŭ *diabla*, ĉio estiĝas simpla. Mi kreskis kun malbona figuro de la muŝoj, malpuraj, kiuj dissemas malsanojn. En kamparaj manĝejoj, ili mortantaj brue vibris, gluitaj al spiralo de glupapero, kiu pendis de la lampo super la tablo, kaj falis en telerojn. Mia edzino, kiel *Diano Ĉasistino*, preferis frapileton. Fakte, dum la tuta somero, mi nur vidis du muŝojn ! Do mi estiĝas nun protektanto de tiu mirinda purigantisto, kiu rekuperas ĉiujn rubaĵojn kaj bestkadavrojn per siaj larvoj, kiuj eble iam nutros nin.

Gandaj krabroj konstruis sian neston sub la bordo de mia tegmento. Flavaj piedoj ! Ĉu azia krabro ? La loka abelbredisto panikis. Laŭ fakulino, ne temas pri *Vespa velutina*, sed pri la arbetojara vespo, *Dolicha vespula media*, kiu pikas nur se oni tedas ĝin, manĝas nur muŝetojn, muŝojn, iomete da nektaron, do ĝi estas protektinda polenistulo. En Francio, la azia krabro ne havas verajn predantojn, nur diversajn birdojn, ĉefe paruonj, kaj parazitojn. Nepras detruiri ĝin, ĝi estas malbona. En Azio la giganta krabro *Vespa mandarinia* estas ĝia natura malamiko¹⁰. Ve, ĝi estas ankoraŭ pli noca por abeloj, kaj tre danĝera por la Homo ! Sed ĝi, same kiel la azia krabro, estas *Natura*. Ĉu ni devu protekti ilin ambaŭ, por gardi la biodiversecon ?

Pri la Homo, ĉu li utila ?

La plej ekstraordinara plenumado de la darvina evoluo estas disvolviĝo de la Konscio. La Naturo sukcesis konstrui por si magian spegulon, kiu diras al ĝi kiom ĝi estas bela, kaj ebligas ke ĝi memkomprenas sin. Ĉiu animalo kapablas kompreni sian medion utile por vivi en ĝi. Tiaj elfaroj estas foje mirindaj, ekzemple la antaŭvidema meteorologio kaj la spaca orientiĝo de migraj birdoj.

La Homo, almenaŭ sur la Tero kaj nun, disvolvis ekstraordinaran konscion de si mem, kaj formale analizis la funkcregulojn de la Dio de Spinozo, t.e. la Naturo, kies parto li estas. Li do povas esti rigardata kiel la plej alta nivelo de la darvina evoluo, tiom bone pro siaj sciencaj kiom pro siaj artistaj, kulturaj, filozofaj plenumoj.

⁷ Mikhail Boulgakov, mémoires d'un jeune médecin (memoroj de juna kuracisto)

⁸ <https://blogs.mediapart.fr/francoise-degert/blog/110318/loup-la-fievre-monte-dans-le-monde-rural> (lupo-la kolero de kamparanoj pligrandiĝas)

⁹ <https://blogs.mediapart.fr/francoise-degert/blog/271114/l-extraordinaire-arnaque-de-la-protection-du-loup> (Ekstraordinara trompo pri protektado de la Lupo)

¹⁰ <http://frelonasiatique.mnhn.fr/lutte/> Franclingve. (Azia Krabro, batalo)

Li nature emas taksu ĉiujn siajn elfarojn kiel "*utilaj*", tamen li estas samtempe juĝisto kaj partio, pro tio ke li estas avataro de Dio¹¹. Tiel, Dio devu nur provi plibonigi lin, eble koste de lia malapero, same kiel ĝi faris ĝis nun pri ĉiuj malaperintaj specioj.

Antaŭ zorgi pri aliaj specioj, la Homo devu komenci protekti sian propran, kiu portas kaj el kiu fontas tiom da kultura riĉeco, kaj elpreni el la medio nur la striktan favoran necesajon selektitan de la evoluo por plui sian vivon.

La Homo sukcesis en la biosfero dank'al sia konkuriva kaj profitema spirito, esence propra al sia *konatuso*. Ve, mi ne vidas multe da signoj ke li povus iam preferi *Esti* al *Havi*, mastrumi sian avidecon, la detruivan potencon de siaj armiloj, antaŭvidi la malproksimajn konsekvencojn de siaj agoj, kaj pace solvi konfliktojn. Se memdetruo ne tute mortigas kelkajn homajn mutaciulojn, nature esperantistojn, kiuj kapablos tiel konduki, lia malapero ŝajnas al mi neevitebla. Ĝi ne atendas dum jarcentoj.

¹¹ Molimard Robert. L'Homme, avatar de Dieu, L'Harmattan 2017. Esperanta traduko eble eldonota (La Homo, avataro de Dio, aŭ *La Homo, konscia ero de Dio*⇒*Naturo*)